

# La Vojo

MONATA GAZETO POR INFANOJ

Eldono de Federacio de  
Laboristaj Esperantistoj  
en la regiono de  
la Nederlanda lingvo



Redakcio: E. Faulhaber, Marathonweg 15,  
Amsterdam-Z. — Administracio: Postbus W. 6.,  
Amsterdam-W. — Postgironummer: 144698

ABONPREZO: f 0.50 jare. — EKSTERLANDE: f 0.65 aŭ 5 respondkuponoj

## INFANOJ EN FRANCUJO LERNAS ESPERANTON

En suda Francujo — 8 kilometrojn de la urbo Monako — kuŝas alte en la montoj la malgranda vilaĝo Eze. Kaj ankoraŭ pli alte — sur la pinto de monto — estas la potofarejo de la familio Thevenet.

Ĉiutage infanoj el la vilaĝo iras al la loĝejo en la rokoj por lerni Esperanton. Nun ili bone parolas la internacian lingvon. Iliaj geinstruantoj diras al ili: „Parolu ĉiam Esperanton: kiam vi iras al la lernejo, kiam vi ludas kun viaj kamaradetoj kaj kie ajn vi estas.” Jen, vi vidas ilin kun iliaj geinstruantoj antaŭ ilia kursejo.

Ĉu vi ne volas sendi al la infanoj belan poŝtkarton kun saluto el via lando? Ili certe ŝatos tion. Ilia adreso estas: „Le Planet”, Eze-village, A. Mmes., Francujo (Frankrijk).

### BESTE KINDEREN!

Zoals wij in het vorige nummer hebben aangekondigd, beginnen wij nu reeds met de vervolgcursus, waarvan de titel „Pli vasta mondo” is. Alle kinderen, die in het vorige seizoen de cursus in „La Vojo” gevolgd hebben, gaan dus met deze lessen verder. Met frisse moed weer aan den gang! De Redactie.

### KARAJ INFANOJ!

En tiu ĉi numero vi trovos la unuajn lecionojn de la daŭriga kurso. Ĝia nomo estas „Pli vasta mondo”, kiel ni jam sciigis al vi en la julia numero. Ĉiuj infanoj, kiuj jam sekvis la lecionojn de „La malgranda mondo”, lernos nun per tiu ĉi kurso. Do, kuraĝe antaŭen!

Redakcio.




## MODERNA KNABETO

J. Mandard, Francujo

Karlo vidas unuafoje ĉielarkon. Li demandas: „Paĉjo, por kiu varo tio estas reklamo?”

varo = handelswaar.



## MIA FRATETO KARLO

Via Geesje

Gustas bonege al mia frateto  
Dolĉaj ĉerizoj sur blanka pladeto.

„Mangŭ, nur mangŭ, knabeto mia,  
Ruĝa fariĝos vangeto via!  
Donu du paroĵn el frata amo,  
Bele ornamos vin mia mano!”

Pendas rubenoj sur liaj oreloj;  
Princo li estas el miaj fabeloj!

## KIOM DA LINGVOJ ESTAS EN LA TUTA MONDO?

Amerika lingvisto Williamson konstatis, kun helpo de multaj scienculoj en diversaj landoj, ke sur nia terglobo oni parolas 2796 lingvojn. El tiuj ĉi profesoro Williamson konsideras 860 kiel ĉefajn lingvojn; nome 48 en Eŭropo, 153 en Azio, 118 en Afrikö, 424 en Ameriko kaj 117 en Aŭstralio kaj sur la insuloj de Granda Oceano.

Profesoro W. asertas, ke la nombro da vivantaj lingvoj senĉese malaltiĝas. Laŭ lia kalkulado malaperas ĉiujare 3 lingvoj. La scienculo atendas, ke en la estonteco la formortado de lingvoj iros pli rapide.

*(Se la teorio de profesoro W. estas ĝusta, regos, — verŝajne post mil jaroj — sur nia tero nur unu lingvo. Tamen neniu el ni ĝisvivos tiun idealan epokon. Tial, karaĵ infanoj, lernu diligente Esperanton, la internacian lingvon, kiu helpos al vi jam nun trovi amikojn inter ĉiuj popoloj de la tuta mondo.*

*Redakcio.)*

## POŝTMARKOJ

Kiu el vi kolektas poŝtmarkojn, sendu al sinjoro *Ismael Gomes Braga*, Rua José Vicente 79, Andarahy, Rio de Janeiro, Brazilio (Brazilië) ilustritan poŝtkarton kaj skribu jene:

....., la 10-an de aŭgusto, 1937.

*Estimata sinjoro!*

*Bonvolu sendi al mi 1 brazilan poŝtmarkon kun teksto en Esperanto. Mi estas 12-jara knabo<sup>1)</sup> kaj kolektas poŝtmarkojn el la tuta mondo. Jam antaŭe dankas al vi kaj salutas vin*

..... (nomo)<sup>2)</sup>

..... (adreso)<sup>2)</sup>

<sup>1)</sup> Ŝanĝu laŭ via aĝo kaj sekso! <sup>2)</sup> Skribu ambaŭ per presliteroj!

# P L I V A S T A M O N D O

2a VOLUMETO DE NIA MONDO  
LERNOLIBRETO POR INFANOJ

Verkita de Annie Rebers

—

Ilustrita de A. Langeberg


## Leciono 1

### En la Mateno

La suno jam brilas hele. Ĝi jam vekis Nikon!

La Patrino vokas: „Niko, leviĝu! Julia leviĝu!”

Niko leviĝas. Li demetas la noktan ĉemizon, prenas la ŝtrumpojn de la seĝo kaj klopodas surmeti ilin. Sed li ne povas surmeti la ŝtrumpojn! Kial ne? Niko prenis ne *siajn* ŝtrumpojn.



*Kies* ŝtrumpojn li havaŝ en la mano? Kompreneble de Karlo! Niko ridas. Nun Niko surmetas *siajn* ŝtrumpojn, *sian* pantalonon kaj *siajn* ŝuojn. Post tio li lavas *sin* en la kuirejo per la akvo kaj la sapo kaj surmetas *sian* bluzon.

En *sia* ĉambreto Julia lavas *sin* kaj vestas *sin*. Per kombilo ŝi kombas *siajn* harojn. En *sia* subjupo ŝi staras antaŭ la spegulo.


„Julia! kie vi restas?” La Patrino vokas denove.  
„Jes Panjo! mi venos tuj”, respondas Julia. Rapide ŝi surmetas *sian* robon kaj iras al *sia* patrino.

Post la matenmanĝo la Patrino helpas Karlon. Li estas jam granda knabo, ĉar li mem surmetas *siajn* ŝtrumpojn kaj ŝuojn. Sed la Patrino lavas lin kaj kombas liajn harojn.

Post tio ŝi helpas Lisetan. La knabineto ne povas lavi *sin* kaj vesti *sin*: ŝi estas tro malgranda. Do la Patrino lavas kaj vestas ŝin. Baldaŭ Karlo kaj Liseta ludas kune.

la bluz-o	— de kiel	mem	— zelf
la nokt-a		la pantalon-o	— de broek
ĉemiz-o	— het nachthemd	la rob-o	— de jurk
demet-i	— uittrekken	si	— zich, zichzelf
la har-oj	— de haren	si-a(j)	— zijn, haar, hun
help-i	— helpen		eigen
la jup-o	— de rok	spegul-o	— 'n spiegel
kies	— wiens wier, welks	surmet-i	— aantrekken
klopod-i	— trachten	la ŝtrump-o	— de kous
komb-i	— kammen	ŝtrump-et-o	— 'n sok
la komb-il-o	— de kam	la ŝu-o	— de schoen
leviĝ-i	— opstaan	tro	— te, al te

Gramatiko: la refleksiva pronomo: *si*; la refleksiva poseda pronomo: *si-a*.



## Leciono 2

### En la lernejo

En la sesa klaso la instruisto pritraktas la geografion. Sur landkarto li montras la kvin mondpartojn. Ili estas Eŭropo, Ameriko, Afriko, Azio kaj Aŭstralio.

La loĝantoj de la mondpartoj estas: la Eŭropanoj, la Amerikanoj, la Afrikanoj, la Azianoj kaj la Aŭstralianoj.

La instruisto montras la grandajn marojn — la oceanojn — inter la mondpartoj. Inter Eŭropo kaj Ameriko estas la Atlanta Oceano, inter Ameriko kaj Azio estas la Granda Oceano kaj inter Azio kaj Afriko ni trovas la Hindan Oceanon.

En la kvina klaso la infanoj lernas la geografion pri Eŭropo. Ili lernas la nomojn de la landoj Nederlando, Belgujo, Anglujo, Francujo, Germanujo, Polujo, Rusujo, Aŭstrujo, Svisujo, Italujo, Hispanujo, Svedujo, Norvegujo, Danujo, kaj tiel plu (k.t.p.).

La geknaboj devas lerni la limojn inter la ŝtatoj, la nomojn de la grandaj riveroj, kanaloj kaj lagoj, la nomojn de la altaj montoj kaj de la montaroj kaj la nomojn de la gravaj urboj. La infanoj devas lerni tiujn nomojn parkere.

Ĉu ili vojaĝos kaj vizitos fremdajn landojn? Poste!

Afrik-o	— Afrika	k(aj) t(iel)	
Afrik-an-o	— 'n Afrikaan	p(lu)	— enz. (enzovoorts)
Amerik-o	— Amerika	la lag-o	— het meer
Amerik-an-o	— 'n Amerikaan	la lim-o	— de grens
la Atlanta	— de Atlantische	la loĝant-o	— de bewoner
Ocean-o	Oceaan	la mond-part-o	— het werelddeel
Aŭstrali-o	— Australië	la mont-o	— de berg
Aŭstrali-an-o	— 'n Australiër	la montar-o	— het berggte,
Azi-o	— Azië		de bergketen
Azi-an-o	— 'n Aziaat	la ocean-o	— de oceaan
Eŭrop-o	— Europa	parker-e	— uit het hoofd,
Eŭrop-an-o	— 'n Europeaan		van buiten
la Grand-a	— de Grote Oceaan	post-e	— later
Ocean-o		pri-trakt-i	— behandelen,
la Hind-a	— de Indische		spreken over
Ocean-o	Oceaan	la ŝtat-o	— de staat, het land
		vojaĝ-i	— reizen


*Gramatiko:* la diftongo: *eŭ*; la sufiksoj: *ujo*, *an*. La instruant(in) instru tiom da nomoj de la ŝtatoj, kiom plaĉas al li (ŝi).

### Leciono 3

#### En la lernejo

La instruisto instruas la gravan literon **n**.

Li skribas sur la tabulo:



La knaboj promenas du horojn.

La vendisto venos jaŭdon.

La breto estas longa du metrojn.

La vojo estas longa tri kilometrojn.

La turo estas alta tridek metrojn.

La vojo estas larĝa ok metrojn.

La puto estas profunda kvin metrojn.

La libro kostas du guldenojn.

La oranĝo kostas ses cendojn.

La sako pezas dek kilogramojn.

La saketo pezas cent gramojn.

„Geknaboj,” diras la instruisto, „bone atentu la literon **n**.”  
Li skribas denove:

Unu pomo kostas kvin cendojn.

*Kiom* kostas ses pomoj?

Ses pomoj *po* kvin cendoj kostas tridek cendojn.

Johano aĉetas ok pirojn.

Unu piro kostas ses cendojn.

*Kiom* Johano ŝuldas?

Ok piroj *po* ses cendoj kostas kvardek ok cendojn.

Unu kesto pezas dek kilogramojn.

*Kiom* pezas sep kestoj?

Sep kestoj *po* dek kilogramoj pezas sepdek kilogramojn.

la bret-o	— de plank	metr-o	— 'n meter
cent-o <sup>1)</sup>	— 'n cent	orang-o	— 'n sinaasappel
gram-o	— 'n gram	pez-i	— wegen
gulden-o <sup>1)</sup>	— 'n gulden	pir-o	— 'n peer
kest-o	— 'n kist	po	— à; tegen... per stuk
kilogram-o	— 'n kilogram	pom-o	— 'n appel
kilometr-o	— 'n kilometer	put-o	— 'n put
kiom	— hoeveel	sak-o	— 'n zak
kost-i	— kosten	ŝuld-i	— schuldig zijn

*Gramatiko*: daŭrigo de la rekta komplemento: la *n* post la difinoj de tempo, mezuro, prezo kaj pezo. La prepozicio: *po*. La korelativo: *kiom*.

<sup>1)</sup> Nederlandaj moneroj; unu guldeno estas cent cendoj.

Les 1. Ter vertaling:

1. Wiens nachthemd ligt op het bed? 2. 's Nachts staan de schoenen van Niko en Karel onder het bed; de broeken en kielen en kousen hangen op een stoel. 3. Maar in de kamer van Julia hangt alleen de jurk en één kous op een stoel; de onderrok ligt.... op de vloer! 4. Natuurlijk wil Julia 's morgens haar kousen aantrekken. 5. Maar waar is de tweede kous? 6. Eindelijk vindt zij haar (!) in (het) bed. 7. Nu moet zij haar schoenen aantrekken. 8. Onder het bed staat slechts één schoen. 9. Waar is de andere schoen? 10. Julia zoekt en zoekt, maar vindt hem (!) niet. 11. Moeder roept opnieuw. 12. Julia zoekt nog en eindelijk ziet zij hem (!) in de hoek onder de kast. 13. Is dat goed?

Opgave: vertel eens — mondeling, maar in Esperanto — aan jullie cursusleid(st)er:

- 1e. wat de mensen 's morgens doen;
- 2e. waar jullie kleren 's nachts liggen.

Les 2. Ter vertaling:

1. In de klas van Niko repeteert de onderwijzer de aardrijkskunde van (= pri) Europa.  
2. „Jan,” zegt de onderwijzer, „wijs op de kaart de staten van Europa.  
3. Herman moet de zeeën, meren en rivieren aanwijzen.  
4. Daarna wijst Niko de grote bergen en bergketens en eindelijk moet Pietje de namen van de belangrijke steden zeggen.  
5. De jongens antwoorden goed, want zij leerden de namen uit het hoofd. 6. Later zullen zij in die vreemde landen reizen en met de bewoners spreken, want zij leren nu Esperanto.

Beantwoordt de volgende vragen schriftelijk in Esperanto:

7. Noem de namen der werelddelen.
8. Hoe heten de bewoners van die werelddelen?
9. Welke oceanen kent ge?
10. Noem de namen van 6 landen in Europa.

Les 3. Ter vertaling:


1. Gisteren wandelden wij vier uur en op Zondag zullen wij weer wandelen. 2. Wij liepen gisteren op een lange weg buiten het dorp. 3. Die weg is lang tien kilometer. 4. Wij zagen een groot huis met een ronde toren. 5. In dat huis zijn vele, grote kamers: één kamer is lang tien meter, breed acht meter en hoog vijf meter. 6. Rondom het huis is een zeer uitgestrekte (= wijde) tuin en in die tuin zagen we een mooie, diepe vijver met vissen. 7. Die vijver is diep drie meter. 8. In een hoek van de tuin — nabij de vijver — staat een klein, groen huis. 9. In dat huisje drinken de bewoners van het grote huis dikwijls thee. 10. Maar spoedig zullen de bewoners naar Zwitserland reizen. 11. Dan zullen andere mensen het mooie grote huis kopen. 12. Hoeveel kost het? 13. Het kost zestig duizend gulden.

## PRI FLOROJ KAJ BESTOJ Verkis kaj desegnis Kees Kok, 15-jara, A'damo

Pasintan semajnon mi vizitis mian amikon. Li havas belan dometon kaj ĉirkaŭ ĝi estas granda ĝardeno. La tutan tagon ni vagis tra la ĝardeno kaj ĉiufoje ni vidis ion alian. Mi estas tiel entuziasma pri lia ĝardeno, ke mi ne povas preterlasi rakonti ion pri tio al vi. Nu, mi komencas.

Por atingi la dometon, oni devas iri tra longa aleo. La dometo mem troviĝas en la antaŭparto de la ĝardeno kaj ambaŭflanke staras altaj popoloj.

Malantaŭ la domo estas la vera ĝardeno; ĝia plej granda parto konsistas el arbaro, en kiu estas kelkaj senarabaj lokoj. En la mezo oni trovas lageton, en kiu oni povas naĝi. La parto ekster la arbaro estas kovrita de eriko. Nun vi scias iom, kia la ĝardeno aspektas!



vostparuo


Mi iris unue en la arbaron. Kiel bela kaj trankvila ĝi estis! Mi eksidis sur benkon, aŭskultis kaj rigardis. Kiam oni sidas tiel trankvile, oni vidas plej multe. Sur la trunkoj de la altaj pinoj pendis birdodometoj. La birdetoj flugetis ĉirkaŭ la branĉoj. La gepatroj venis kun nutraĵo kaj la junaj idoj malfermegis siajn beketojn kaj glutis vermojn kaj insektojn. Aliaj junaj birdoj jam ricevis sian unuan lecionon en la flugado. Mi aŭdis senĉese la birdajn voĉetojn: Pip, pip!

Kiam mi levis min, la birdetoj momenton forflugetis, sed tuj revenis. Ili estis tre belaj; mi vidis rubekolojn, paserojn kaj ankaŭ paruojn. Paruoj estas akrobatoj, kiujn oni vidas ofte en la vintro kaj kiujn oni nutras per nuksetoj. Ni konas diversajn specojn de paruoj, ekzemple tiujn kun larĝa nigra linio sur flava brusto kaj tiujn kun tre longa vosto.

Mi renkontis multe da aliaj birdoj, kiuj manĝas blujajn kaj ruĝajn vakciniojn, tiom ŝatataj ankaŭ de la homoj. En la supro de la pinoj sidis kolomboj sur siaj nestoj. Tra la nestoj mi povis vidi la ovojn, ĉar la nestoj de la kolomboj estas tre senorde faritaj el branĉetoj kaj trunketoj. De malproksime mi aŭdis la vokadon de la kukolo: Kukuk, kukuk, kukuk!

Subite eksaltis antaŭ miaj piedoj sciuro kaj en unu momento ĝi jam sidis super mia kapo sur alta branĉo kaj rigardis malsupren.

Mi venis nun al la lageteto, en kiu naĝis multe da akvobirdoj kaj en kiu kreskis multe da akvoplantoj. Sed pri la lageteto kaj ĝiaj loĝantoj mi rakontos sekvontan fojon.



juna pasero.

aleo = laan; poplo = populier; vermo = worm; rubekolo = roodborstje; paruo = koolmees; vostparuo = staartmees; vakcinio = bosbes; kukolo = koekoek; sciuro = eekhoorn.

	1	2	3
1			
	★		★
2			
	★		★
3			

## ENIGMO

W. Borsje, Roterdamo

Horizontale kaj vertikale:

1. Parto de kreskaĵo.
2. Nombro.
3. Parenco.

## EL LA INFANGRUPOJ

*Amsterdam.*

Kelkaj infanoj el „La Mondamikoj” kaj el „La Juna Espero” pasigis unu semajnon ĉe siaj geamiketoj „La Junaj Pioniroj” en Gento (Belgujo). Ili forveturis el Amsterdamo per aŭtobuso la 18-an de julio kaj revenis la 24-an el Gento. Akompanis ilin la gvidantinoj, k-dinoj M. Bishoff kaj C. Vrees.

*Laŭ deziro* ni publikigas la nomojn de niaj infangrupoj:

1. Gento: „La Junaj Pioniroj”. — 2. Amsterdamo: „La Mondamikoj”. — 3. Amsterdamo: „La Juna Espero”. — 4. Roterdamo: „La Junaj Zamenhofaj Geamikoj”. — 5. Gouda: „Verdaj Papagetoj”. — 6. Hago: „La Kolomboj”. — 7. Arnhem: „La Verda Junularo”. — 8. Gouda: „La Verdaj Pigoj”. — 9. Scheveningen: „Amikeco”. — 10. Roterdamo: „La Malgranda Mondo”.

## DEZIRAS KORESPONDI:

*Friedrich Petuely*, 15-jara lernanto, Märzstr. 11/36, Wien-XV., Aŭstrujo (Oostenrijk).

*Ejnar Stentoft*, 12-jara knabo, Brøndum, Lögstör, Danujo (Denemarken).

*Vlasta Vyhliđková*, 14-jara knabino, Slezská ĉ. 105, Praha-XII., Ĉeĥoslovakujo (Tsjeĥo-Slovakije).

*Miloslav Trubl*, 14-jara knabo, Panská ul. 15, České Budějovice, Ĉeĥoslovakujo (Tsjeĥo-Slovakije).

ĵus aperis:

## NIA MONDO

lerno-libreto por infanoj — 1-a volumeto

**La Malgranda Mondo,**

verkita de Annie Rebers,

ilustrita de T. Langeberg.

Prezo f 0.30 aŭ 3 respondkuponoj.



Eldono de Libro-Servo FLE.

Postbus O. 50, Amsterdam, Nederlando.

